

Heinrich Heine,
En la mirinda bela Maj'

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj',
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',
dum birda tril' ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)